

Sennaciulo

Sennaciulo, septembro 2007, n°9 (1227), MENSUEL/MONATA, ISSN 1163.0442, prezo 5 €



Vendo de teksaĵoj produktitaj laŭ egaleca komerco en Senegal

Fotis: ho visto nina volare, aŭgusto-2006

Fonto: <http://flickr.com/photos/41099823@N00/224334587>

Permesilo: <http://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>

Festo de la Homaro 2007



De la 14-a ĝis la 16-a de septembro 2007 okazis en Pariza regiono jam delonge tradicia "FESTO DE LA HOMARO" (L'Humanité - organo de la Franca Komunista Partio). Ankaŭ jam tradicie en la festo partoprenas esperantistoj. Ĉi-jare estis instalita budo de FET (Fédération Espérantiste du Travail), kun helpo de aliaj parizaj asocioj - SAT-Amikaro, JEFO.

La feston vizitis pli ol 500.000 personoj. Dudek tri esperantistoj laboris en la budo por informi pri Esperanto, vendi krespojn kaj trinkaĵojn. Vi povas rigardi la fotojn pri la budo ĉe la adreso: <http://picasaweb.google.fr/alekska/FTeDeLHuma2007>. La budo estis granda kaj ĉiam plena de vizitantoj. Konkrete ni vendis 60 lernolibrojn kaj disdonis 5000 flugfoliojn/kalendaretojn (kun informo pri Esperanto). En la festo ni afiŝis 60 afiŝojn pri Esperanto. Grandan intereson provokis la eldonaĵoj de la SAT-Eldonkooperativo (T-ĉemizoj, glumarkoj) kaj de SAT-Amikaro (afiŝoj pri Internacia Solidareco).

Frederiko



Karaj gelegantoj,

pro la fermo de la presejo dum aŭgusto, nia Sennaciulo daŭre aperas malfrue kaj kun prokrasto. Ni esperas ke iom post iom ni sukcesos retrovi la normalan aperritmon.

Kiel vi povas konstati ni daŭrigas aperigi en ĉiu numero dosieron pri iu temo, ĉar saĝas ke tio plaĉas al vi.

Por la venontaj numeroj ni proponas al vi jenajn temojn :

Oktoebro:

Personoj en handikapigaj situacioj.

Sendu viajn kontribuojn al Gerardo Lieblang
lieblang.gerard@neuf.fr

Novembro:

Politika situacio en Latina Ameriko.

Sendu viajn kontribuojn al Pablo Foche
pablofoche@telefonica.net

Por la venontaj monatoj bonvolu sendi al ni la temojn kiuj interesas vin kaj pri kiuj vi deziras ke ni parolu.

Kiel vi povas konstati, nia Asocio komencas prepari sian restrukturiĝon kiu nepre devos okazi post la emeritiĝo de nia ĝenerala sekretario. En la paĝo 126, k-dino Tereza Sabatier prezentas diversajn taskojn kiujn devos transpreni pluraj volontuloj. Aliaj taskos sekvos en venontaj numeroj. Ĉar la estonto de SAT dependas de vi ĉiuj, bonvolu atente legi, pripensi kaj anonci vin al la SAT-ejo (PK de SAT) por transpreni iun el tiuj taskoj.

Esperante vian komprenemon kaj pretecon helpi per kunlaboro, kamaradece salutas vin

Redakta Komitato

Etika vivo : ĉu ebla en kapitalisma mondo ?

Enkonduko

Egaleca komerco, etikaj bankoj, kooperativoj, mutualoj... jen nomoj de diversaj provoj, kadre de la nuna kapitalisma mondo, jam funkcii laŭ aliaj reguloj, en sistemo kie la profito ne plu estas la centra celo. Ĉu tio vere funkcias ? Se jes, je kiu skalo ? Ĝis kia grado ? Kun kiuj renkontitaj problemoj ? La ĉi-monata dosiero provos respondi ĉi-tiujn demandojn, unue per skizeto pri la bazaj principoj de la socia ekonomio, kaj poste per analizo de kelkaj konkretaj ekzemploj.

Kio estas socia ekonomio ?

La ĉi-suban skizon mi redaktis surbaze de notoj faritaj antaŭ iom pli ol du jaroj, kadre de kolokvo organizita en Liono de la Franca Instruista Asekur-Mutualo (MAIF, kiu ankaŭ estas la asekuranto de SAT) pri socia ekonomio. La tri partoj respondas al la intervenoj de tri sinsekvaj prelegantoj.

Historiaj bazoj

La socia ekonomio konsistas el asocioj, fondaĵoj, kooperativoj, kaj mutualoj, kiuj ne celas unuavice profiton, sed provizon de servoj al homoj. Ili funkcias laŭ la demokratia principo "unu persono = unu voĉo", dum en ordinara kapitalisma entrepreno la pezo de la administrantoj estas proporcia al la graveco de ilia kapitalo. La agantoj estas la societanoj mem, kiuj elektas siajn estrojn kaj kunlaboras, male al tio kio okazas en kapitalismaj entreprenoj, kie estas klaskonfliktoj. La unuaj provoj funkciigi socian ekonomion laŭ tiuj ĉi principoj

ekis en Okcidenta Eŭropo komence de la 19a jarcento, spronite de la t.n. "utopiaj socialistoj", kiel Furiero kaj Oŭeno (Owen). Tamen indas ankaŭ substreki, ke tre aktivis en tiuj ĉi movadoj ankaŭ sociemaj kristanoj, kiuj same rifuzis liberalismon kaj socialismon. La juraj statusoj kaj graveco de tiuj ĉi agadformoj multe variis laŭ la lokoj kaj la epokoj. En Francio, la disvolviĝo de la mutualismaj projektoj konsistigis la bazon de la socia sekureco. La kooperativa movado iom post iom forfalis post la dua mondmilito, pro kunfrontiĝo kun la kapitalisma konkurenco. Kelkaj organizoj sukcesis pluvivi, sed per parta adaptiĝo al la kapitalisma modelo. La unaj klientoj de mutualaj asekuroj ĝenerale kondukas kiel banalaj klientoj, kaj apenaŭ konscias pri la specifeco de la organizo, al kiu ili aliĝas. La mutualisma movado do frontas la demandojn pri plua banaliĝo, aŭ refondo surbaze de servo al la membroj, kaj povo al la societanoj.

Ekonomiaj specifajoj. Pezo en la nuna mondo.

Estas malfacile interkonsenti pri objektiva kriterio por mezuri la pezon de la sociaj entreprenoj en la nuna ekonomia mondo. Ŝajnas tamen, ke ili konsistigas 10% el la laborpostenoj en Eŭropa Unio. En Rodanio (Liona departemento), tiuj ĉi-postenoj dispartiĝas jene : 81% por asocioj, 11% por kooperativoj, 5% por mutualoj. Multaj el la dungitoj estas virinoj, kaj portempaj dungitoj. Ankaŭ 25% el la francaj bankoj estas kooperaj, almenaŭ teorie...

Tio tamen ne indikas la realan ekonomian aktivecon, kiu estas malfacile mezurebla,

Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T

Asocia sidejo de S.A.T., administrato kaj redakto: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopio: +33.1.47.97.71.90. Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: http://www.satesperanto.org.; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39 - BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Redakta Komitato - Cyril Orsingher, Tonyo Del Barrio, Viola Ando Murasaki, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markov, Vito Markov, Nikolao Gudskov, Gary Mickle, Jacques Schram, Jomo Ipfelkofer, Vincent Charlot, José Maria Salguero. Provizora ĉefredaktoro kaj engaĝigisto:

Kreŝimir Barković. Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redakto.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas monate - Mensuel. Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro. Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

